EKO 2022
Esperiga Komuniko

Subtene al la regiona, landa kaj loka agado

UEA ilei IF EF

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Gbeglo Koffi, Elda Doerfler

**ENHAVO n-ro 55> • Eŭskio • Ĉinio • Fervojistoj • Serbio < oktobro 5**

# En Eŭskio UEA festis la Tagon de Paco

Okaze de la 20a Internacia Tago de Paco, Ne-Registaraj Organizoj partneraj kun Unesko, kunlabore kun la guberniaj (eŭskaj) instancoj kaj UEA, organizis grandan eventon, la 17an de septembro 2022, en Toloso (Eŭskio, norda Hispanio). Jam antaŭ tri jaroj Esperanto estis elektita kiel unu el la kvar laborlingvoj de la aranĝo Tamen multaj el la organizoj, kiuj kontribuis al la evento per sendo de 3-mn filmeto de koruso kantanta por paco, estas ĉu esperantistaj, ĉu kontaktitaj per nia informkampanjo.
Vidu la abunde ilustritan alkroĉaĵon.

# Drama elpaŝo en Ĉeĥio

Okazis landa esperanta konferenco en ĉeĥa urbo Pardubice. Tie denove prezentis sin teatra grupo DOMA de studentoj el urbo Svitavy. La grupo teatraĵis en pluraj I|K. La lasta parto de la suba video estas ĝenerale konata nacia rakonto: 'Ludetoj kun diablo'. La komenco de la video temas pri la urbo Pardubice.

https://www.youtube.com/watch?v=AQBRC8AIq4U

Jindřiška Drahotová

# Nova kursaro en Ĉinio

Jen la listo de la novaj kursoj en la Zaozhuang-a Universitato, publika universitato en Ĉinio. Temas pri devigaj kursoj por la novaj 24 unu-jaraj studentoj de la Eo-fako.

1) Baza Esperanto 1, 1 horon kaj 30 minutojn tri fojojn semajne; dauro: 16 semajnojn,
Instruisto: Li Hui
2) Historio de Esperanto, 1 horon kaj 30 minutojn unu fojon semajne; dauro: 16 semajnojn
Instruisto: Sun Minĝiao
3) Aud-vida Esperanto, 1 horon kaj 30 minutojn unu fojon semajne; dauro; 16 semajnojn.
Instruisto: Park Ki Wan
4) Parola Esperanto, 1 horon kaj 30 minutojn unu fojon semajne; dauro: 16 semajnojn
Instruisto: Alessandra Madella.

Informoj de Alessandra

# Duonpaĝo pri Esperanto en Berlino

Ĉiu-semajne la berlinanoj ricevas senpage la gazeton *Berliner Woche* en la leterkesto kun 24 lokaj eldonoj. En duono de la lokaj eldonoj estis en septembro 2022 prezento de Michael Vrazitulis (prezidanto de Germana Esperanto Junularo GEJ) pri Esperanto, la ekesto, la celoj kaj la aktiveco de GEJ, kun kontaktadresoj kaj retaliro. Jen la traduko de la germanlingva teksto de la ĵurnalistino Ulrike Martin.

https://esperanto.berlin/berliner-woche-36-2022/

Roland Schnell, respondeca por publika agado:

# Aminda mesaĝaro el Madagaskaro

**Ĉi tiu idealisma celo validas eĉ hodiaŭ, eĉ se lernado sole ne sufiĉas.**

La ELSENDO N°123 de Aminda Radio Esperanto denove aperas post la feria paŭzo. La enhavo komenciĝas per fabelo el la oriento de Malagasio. Alia interesa rubriko pritraktas la valoran lignaĵon Nato aŭ Nanto. Ni ne forgesas aldoni kelkajn novaĵojn de la kuranta monato. Nia podkasto proponas al vi ankaŭ Esperanto-kanton el la nova albumo *Intergalaksia* kaj la tuto finiĝas per eta leciono pri la malagasa lingvo. Aminda Radio Esperanto helpas vin konatiĝi kun nia bela insulo Malagasio. Ni invitas vin aŭskulti ĝis la fino nian programon.

**https://youtu.be/m9Lrsx_g3lI**

Monata revuo en Esperanto de mi prizorgata: *Panoramo de La Granda Insulo* Respondecas pri la retradio AMINDA RADIO ESPERANTO alirebla ĉe:Jutubo, Linkedin kaj fejsbuko

Henriel FIDILALAO, ot IAG 27 B Antoetra, MG 102 AMBOHIDRAPETO
+261 (0)32 53 035 93, kajpo: belafino
WeChat ID: henriel2018; hatsapp: +261325303593

# Morfologia studo nun akirebla

En la libroservo de UEA aperis la libro “Enkonduko en la morfologion de Esperanto” (EME) de la pola esperantologo Ryszard Rokicki, kiun ĉi-somere kuneldonis la Ruslanda eldonejo “Sezonoj” kaj Litova Esperanto-Asocio. Legu pli pri EME kaj, se vi interesiĝas pri Esperanto kiel lingvo, mendu ĝin
https://sezonoj.ru/2022/09/eme/

# Fervojistoj el la mondo venos al Antverpeno

La IFEF-kongreso okazos en Antverpeno inter la 6-a kaj 12-a de majo 2023: Post bonega sperto en Beroun ĉi-jare belgaj fervojistoj volas daŭrigi la tradicion organizante la venontan kongreson en Antverpeno, granda kaj malnova havenurbo en Flandrio (Belgio) kun bela impona stacidomo (vidu la foton fine).

LKK jam publikigis la unuan informilon, kiun vi petu de IFEF. La kongresejo estos la junulargastejo Pulcinella kiu troviĝas meze en la historia centro de Antverpeno. Tie ni rezervis por vi malmultekostajn ĉambrojn kun la ebleco ankaŭ trifoje tage manĝi surloke.

Ni estas preparantaj por vi allogajn ekskursojn, varian vesperan programon kaj interesajn prelegojn. Se vi ne tro lacos, post Antverpeno atendas vin postkongreso en Valonio kun vizito de belaj lokoj. Ĝi okazos de la 12-a ĝis la 15-a de majo 2023.

Kiam vi ricevos la aliĝilon aŭtune, ni konsilas al vi tuj aliĝi kaj mendi ĉambron en la kongresejo se vi tie deziras loĝi. La kvanto da malmultekostaj ĉambroj estas limigita. Ankaŭ pageblaj hotelĉambroj fakte ne tro abundas en la urbo. LKK provos helpi vin trovi hotelĉambron kvankam tiun rezervon vi devos mem prizorgi. Ni atendas vin en Antverpeno en Majo 2023 por komune kongresi!

Pliaj informoj: info@ifef2023.net , http://ifef2023.net

El Internacia Fervojisto, 29022-5



# Slovenaj informoj

Bonvolu trafoliumi la alkroĉitan novan numeron de la bulteno *Informacije / Informoj 2022/3 (septembro)*.

Ĉiuj numeroj de la bulteno estas je dispono per la ligilo:

http://www.esperanto.si/eo/bulteno-informacije-informoj-0.

Ostoj KRISTAN, sekretario de SIEL

# Informado en Serbio per la BBC

Hodiaŭ aperis longa artikolo pri Esperanto kaj Esperanto en Serbio, serblingve en BBC, okaze de la Eŭropa Tago de Lingvoj:
**https://www.bbc.com/serbian/lat/srbija-63028612**

Aranka Laslo

# Plia kurso en Francio

De: **edukado.net** <redaktanto@edukado.net>

La redaktoro de edukado.net informas vin ke aldoniĝis nova ero ĉe la Kursejo.

Nomo: Espéranto Le Beausset
Gvidantonomo: Lafitte Nicole
Tipo: Nova movada kurso
Loko: Le Castellet, Francio
Aldoninto: mirann

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27452

# La mil-era Ondo meritas subtenon

La novaĵretejo “La Ondo de Esperanto” kun plezuro anoncis, ke ekde la 1-a de januaro 2020 jam dum 1000 sinsekvaj tagoj en ĉi tiu novaĵretejo ĉiutage aperas almenaŭ unu nova teksto (artikolo, eseo, recenzo, beletraĵo, anonco) en Esperanto! Ĝis nun neniu esperantista asocio, instanco aŭ fondaĵo subtenis la solan ĉiutage renovigatan Esperantan novaĵretejon. Ĝia funkciado dependas nur de la helpemo de tiuj, kiuj abonas la ĉiusezonan bitgazeton “La Ondo de Esperanto”. Se vi ne abonas ĝin, sed deziras helpi la retejon, abonu ĝin aŭ abonigu vian amikon por 2022 kaj/aŭ 2023. Legu pliajn informojn kaj la liston de la plej legataj tekstoj ĉe:

https://sezonoj.ru/2022/09/ondo-103/

Nia 55-a Komuniko eliras precize en la tago de la 74-a naskiĝtagon de la ĉefa prizorganto de la EKO-kominikoj. Nur unu plia jaro de streboj por EKO, AMO, Fondaĵo Canuto kaj portado da pezaj sakoj da varoj kaj la koncernato atingos la safiran jubileon!

========= vortoj: 945=========

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis majo 2022 (per EKO 2022-25). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso.